BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

REVUE PRO ŠÍŘENÍ ESPERANTA MEZI ČECHY.

ORGÁN „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ" V RAKOUSKU.

REDAKTOR A VYDAVATEL:

H. K. BOUŠKA.

ROČNÍK VI. — SEŠIT 2.

(Únor-1912-Februaro.)

Cena 36 hal.

REDAKCE A ADMINISTRACE:

H. K. BOUŠKA, PRAHA-SMÍCHOV 730, NA CELNÉ 4.

Celoroční předplatné 4 K,

pro členy spolků sdružených ve „Svazu čes. esp." 3 K; jednotlivá čísla 36 hal.

MNOHO PENĚZ stojí vydávání revue tak úpravné a obsažné jako je naše, proto nemůžeme dávati ji zadarmo i prosíme: nezaplatil-li jste předplatné, případně členský příspěvek, učiňte tak ihned, nebo aspoň co nejdříve!

ODMĚNÍME KAŽDÉHO, kdo získá nám několik nových předplatitelů, kdo získá nám insert a pod. Bližší sdělí administrace.

Veškeré dotazy čtenářů ochotně uveřejníme, případně zodpovíme sami v revui (nikdy dopisem!). Ptejte se!

Každý návrh a každý pokyn bedlivě uvážíme. Sdělujte!

ČTĚTE A JEDNEJTE!

Kde a kdy možno u vás pořádati přednášku o esperantu? Sdělte redakci a ta zařídí další!

Kde a kdy se scházíte pravidelně u vás s esperantisty? — sdělte nám a my uveřejníme.

O každém podniku pro esperanto, o přednášce, kursu, výstavě, schůzi, zábavě, článku, projevu význačné osoby atd. podejte nám stručnou zprávu (na kor. lístku)!

Kolik esperantistů ve svém místě a okolí znáte? Sdělte nám jich adresy. Budeme Vám vděčni za to!

S kým pravidelně dopisujete si esperantsky? Napište nám adresy svých cizozemských dopisovatelů, kteří promptně odpovídají. A stejně: sdělte nám adresy osob, které na esp. dopisy neodpovídají!

Odebírejte revui „Český esperantista“! — tak žádejte v místnostech, jež často navštěvujete!

Inserujete v revui „Český esperantista“? — tak se ptejte svých dodavatelů!

Jste uveden v seznamu těch, kdož přispěli na propagační fond „Svazu čes. esp.“? Ne-li, vzpomeňte naň při placení předplatného nebo členského příspěvku! Každý obnos je vítán a veřejně kvitován.

Co se Vám líbí a co se Vám nelíbí v „Čes. esp.“, sdělte nám dopisem!

Sazečský šotek zle řádil v posledním čísle následkem technických změn provedených tiskárnou po poslední revisi čísla. Opravujeme nejhrubší omyly v naději, že menší omyly opravil si čtenář sám:

Korektitaj preseraroj de la lasta numero: Sur la 2. paĝo legu: pozornosti (17. linio de supre). Pĝ. 3 apartenas (23. l. d. s.), ekonomiistoj (25. l. d. s.), ĝeneralan (27. l. d. s.). Pĝ. 4. ĝi sendube (14. l. d. malsupre), kun ŝi (7. l. d. ms.). Pĝ. 6. Joĉjo (15. d. s.). Pĝ. 7. Signifo (1. d. s.), necesaĵo (13. d. ms.), býti **pro všechny národy světa** velmi (6. l. d. ms.). Pĝ. 8. ĝiaj larmoj estus (4. d. s.), diferenciĝas (5. kaj 12. l. d. s), fakto (10. l. d. s.), enmetitaj (26. d. s.), bonkore (29. d. s.), aŭstriaj esperantistoj (7. d. ms.!), kunlaboratoj (21. d. ms.). Pĝ. 9. rifuzis (1. d. s.), maldecaĵo (36. d. s.), okazinta (38. d. s.), vermontská (6. d. ms.). Pĝ. 10. vzpomněl (6. d. s.), vítězném (19. d. ms). Pĝ. 11. svých (28. d. s.), skutečně (28. d. s.). Pĝ. 12. spoluvinni (16. d. s.), spravedlnosti (12. d. ms). Pĝ. 13. propagátor (23. d. s.), měšťanské (12. d. ms.). Pĝ. 14. smysl (23. d. s.). Pĝ. 16. auxilliaire (2. d. s.), Gautherot (3. d. s.), por ĉiu biblioteko (sen: Nova sento, 30. d. s.), aperados (31. d. s.), 1 Sm = 2·40 K (33. d. s.). — Ni petas pardonon kaj promesas eviti tian malagrablaĵon estonte.

Vševědoucí pan Kühnl „ví“, že nakladatelem „Čes. esp.“ byl pan Ryšavý, knihkupec v Praze. My ani pan Ryšavý o tom nevíme ničeho. Maličkost, ale charakteristická. Taková je informovanost p. Kühnla a na ní on zakládá své — pravdy!

Cigán hádá dle své planety — v „Čas. čes. esp.“. Promluvíme si o tom příště. Kdo vyvolal duchy, ať si je zažehnává, až budou svědčiti proti němu.

Adresoj de diverslandaj korespondantoj. — 11. Fernand Lepercq, 2 rue Louis Blanc, Levallois Perret, Seine, Francujo. — 12. C. Yosé Benitez, Hotel Internacional, 3 a, Mololina, 42, Mexiko, Ameriko, — 13. F-ino Mathildo Fuchs, Esztergam, Strato Petöfi 6, Hungario. — 14. Saritschev, Kontora Gnbina-Kui, Astrachan, Rusujo. — 15. C. Vellozo, Rio de Janeiro, rua 7 Septembo, Brazilio.

ROZŘEŠENÍ OTÁZKY POMOCNÉHO JAZYKA DOROZUMÍVACÍHO.

Předmluva k prvé knize o esperantu. Napsal Dr. *L. L. Zamenhof.* Přeložil *Rud. Hromada.* — (Pokrač.)

Nebudu zde rozebírati různé pokusy, jež se dály za účelem utvořiti jazyk mezinárodní. Obrátím jen pozornost čtenáře na to, že všechny tyto pokusy buď byly systémem značek ke krátkému dorozumění se v případě velké potřeby, nebo se spokojily s co nejpřirozenějším omezením mluvnice a nahražením slov existujících v jazycích národních slovy jinými, libovolně vymyšlenými. Pokusy prvého druhu byly tak složité a tak nepraktické, že všechny zašly hned po vzniku; pokusy druhého rázu byly již jazyky, ale mezinárodního neměly v sobě nic. Autoři nazvali své řeči „světovými", snad jen proto, že v celém světě nebylo nikoho, s nímž by bylo možno dorozuměti se těmito jazyky! Stačí-li pro světovost nějakého jazyka, aby jedna osoba jej tak nazvala, pak každý z existujících jazyků se může státi světovým dle přání jednoho každého. Poněvadž tyto pokusy byly založeny na bláhové naději, že svět vyjde jim vstříc s radostí a jednomyslně jim dá svojí sankci, a poněvadž tento jednomyslný souhlas je právě nejméně možnou částí věci pro přirozenou lhostejnost světa k pokusům z kabinetů nepřinášejícím mu bezpodmínečně užitku, nýbrž počítajícím na jeho ochotu věnovati jim jako průkopník svůj čas — je pochopitelno, proč tyto pokusy setkaly se s úplným nezdarem; poněvadž největší část světa pranic se nezajímala o tyto pokusy a ti, kteří se zajímali, uvážili, že nestojí za to ztráceti čas učením se jazyku, v němž nám nikdo neporozumí kromě autora; „nechť se nejdříve svět," řekli, „nebo několik milionů lidí naučí tomuto jazyku, pak i já se mu budu učiti". A věc, která by mohla přinésti užitek každému stoupenci jen tehdy, jestliže by již dříve existovalo takové množství stoupenců, nenalezla nikoho, kdo by jí přijal a ukázala se mrtvě narozenou. A jestliže jeden z posledních pokusů „Volapük" dosáhl, jak se praví, jistého počtu stoupenců, je to jen proto, že sama myšlenka jazyka „světového" je tak vznešená a vábná, že lidé, kteří jsou nakloněni nadchnouti a věnovati se průkopnictví, obětují svůj čas v naději, že se věc s n a d podaří. Ale počet nadšenců dosáhne jisté cifry a zastaví se, a chladný lhostejný

svět nebude chtíti obětovat svůj čas na to, aby se mohl stýkati s těmito nemnohými, — a tento jazyk podobně jako předešlé pokusy zajde neposkytnuv pražádného užitku*).

Otázka jazyka mezinárodního zaměstnávala mne již dlouho; ale necítě se ani talentovanější ani energičtější nežli tvůrci všech neplodně zaniklých pokusů, omezoval jsem se dlouho na snění a mimovolné rozjímání o této věci. Ale několik šťastných nápadů, které se objevily jako plod toho mimovolného rozjímání, dodalo mi odvahy ku práci další a přimělo mne, abych se pokusil, zda nepodaří se mi soustavně přemoci překážky utvoření a v život uvedení rozumového jazyka mezinárodního. Zdá se mi, že ta věc se mi poněkud podařila, a ten plod dlouhé usilovné práce předkládám nyní ku posouzení čtoucímu světu.

Nejhlavnější otázky, jež bylo nutno řešiti, byly:

I. aby jazyk byl neobyčejně snadný, tak, aby bylo možno naučiti se mu hravě;

II. aby každý, kdo se naučil tomu jazyku, mohl jej ihned používati k dorozumění se s lidmi různých národů bez ohledu na to, zda ten jazyk byl přijat celým světem čili nic — t. j. aby jazyk již od samého počátku a dík své vlastní stavbě mohl sloužiti za skutečný prostředek pro mezinárodní sdělení;

III. nalézti prostředek ku přemožení lhostejnosti světa a přiměti jej, aby jak možno nejdříve a hromadně počal užívati navrhovaného jazyka jako jazyka živého — ne s klíčem v rukou a v případě nejkrajnější potřeby.

Ze všech návrhů, jež v různých dobách byly předloženy světu, často pod zvučným, ničím neoprávněným názvem „jazyka všesvětového“, nikdo nerozřešil než jenom j e d n u z uvedených otázek, a i tu jenom č á s t e č n ě. Kromě nahoře uvedených tří hlavních otázek, musil jsem ovšem rozřešiti ještě mnoho jiných, ale o nich, poněvadž nejsou podstatny, nebudu zde mluviti. Nežli přejdu k vysvětlení toho, jak jsem rozřešil nahoře uvedené otázky, musím prositi čtenáře, aby uvažoval trochu o významu těch otázek a nebral na lehkou váhu mých prostředků řešení jen jedině proto, poněvadž se mu snad objeví jako velmi jednoduché. Prosím za to proto, poněvadž znám sklon většiny lidí k tomu, pohlížeti na věc s tím větší úctou, čím je složitější, obsáhlejší a nestravitelnější. Takové osoby, spatřivše malinkou učebnici s pravidly nejjednoduššími a nejpochopitelnějšími pro každého, mohou posuzovati

*) Tato slova byla napsána počátkem roku r. 1887, kdy Volapük požíval v celém světě slávy a dělal rychlé pokroky! Čas ukázal, že předpoklad autora esperanta nebyl mylný.

věc s pohrdlivou neúctou, zatím co právě dosažení této jednoduchosti a stručnosti, přivedení každého předmětu z tvarů složitých, z nichž povstaly, k tvarům nejsnadnějším — představovalo nejobtížnější část práce.

(Pokračování.)

ESPERANTO MEZI ČECHY V ROCE 1911.

Závěr z jednatelské zprávy „Svazu českých esperantistů“. Napsal a přednesl gen. sekretář S. č. e. *Mil. Schmidt.*

V jednatelské zprávě, kterou podal jsem na sklonku předešlého správního roku, vyslovil jsem naději, že všeobecná stagnace jevící se v českém hnutí esperantském dále již postupovati nebude, a že možno očekávati, zejména pod vlivem světového kongresu esperantistů v Antverpách, nové vzpružení a nový vzestup myšlenky esperantismu u nás. Bohužel naděje tato se nesplnila, a pokládám za svou povinnost v jednatelské zprávě, která podati má v širokých rysech pravdivý obraz hnutí v roce minulém, zanechati všech řečnických příkras a pověděti pravdu, třeba trpkou, o stavu esp. hnutí u nás a o příčinách, které jej zavinily.

Kdybych následovati chtěl jiného oficielního místa v esp. organisaci české a posuzoval stav hnutí dle počtu nově založených spolků, dle počtu vyučovacích kursů, přednášek, sjezdů a jiných manifestací esperantských, mohl bych ovšem podati Vám nadšený referát o vítězném postupu esperantismu u nás a utvrzovati u nás i v cizině bez toho již rozšířené mínění, že Bohemujo jest jednou z nejprobudilejších částí světové vlasti esperantské.

Stoje však na stanovisku, které bylo jednou z hlavních příčin založení naší samostatné organisace, že barnumská, prázdná reklama přinášející sice chvilkový úspěch, ale později tím větší trvalou škodu, jest zavržitelna, že ne počet spolků nebo členů získaných sám o sobě, nýbrž smýšlení esperantské, přesvědčení o vnitřní pravdě a hodnotě myšlenky esperantské pronikající každého jednotlivce, jenž zove se esperantistou, jest jediným kriteriem postupu esperantismu, tedy s tohoto stanoviska nemohu o českém hnutí esperantském vůbec podati zprávy uspokojující.

Když sledujeme propagační činnost, která jest hlavním účelem našich organisací, vidíme téměř vždycky opakovati se týž proces. Zajímavé zprávy žurnálů o cizozemských manifestacích esp., o účastenství vynikajících učenců a hodnostářů, o vysokých vyznamenáních, jichž dostává se autoru esperanta atd., atd., vzbuzují živý interes publika, propagační přednáška v místě uspořádaná způsobí chvilkové nadšení slovanské po-

vaze vlastní, založí se klub, uspořádá se kurs vyučovací, do něhož hrnou se houfně nadějní esperantisté, do novin zašlou se nadšené zprávy o novém spolku, o novém úspěchu myšlenky esperantské atd. A po 2—3 měsících? Noví adepti esperantismu vidí, že esperanto přes svoji snadnost neleze samo nikomu do hlavy, že i tu třeba se učiti, a kdo zná nechuť většiny naší t. zv. inteligence ke každé duševní práci, nediví se, že kurs z počátku hojně navštívený, zanikne nedostatkem účastníků. A tito schladlí esperantisté nejen neznamenají pro naši věc ničeho, nýbrž stávají se jejími nepřáteli a vyhledávají všemožné námitky proti esperantu, aby zakryli hlavní příčinu svého neúspěchu — vlastní lenost. Toť jsou neutěšené zjevy v propagační činnosti po stránce lingvistické, které nás učí, že kursy mají pořádati se jen tehdy, je-li k disposici způsobilý, inteligentní učitel, který účastníkům neslibuje věcí nemožných, a dovede svým žákům nejen vštípiti esp. gramatiku, nýbrž zároveň přetvořiti je v esperantisty z přesvědčení.

Ještě smutnější pohled poskytuje české hnutí esperantské, posuzujeme-li je se stanoviska vnitřní idey esperantismu. Každý pochopí, že mám na mysli poměr naší organisace k Unii, tedy poměr dle představy prostého, poctivého esperantisty bratrské organisace k organisaci. Kdo prožil všecky ty nízkosti, nestoudné lži, utrhání na cti, která ve jménu esperantismu vrhána byla v posledním roce proti Svazu a jeho funkcionářům, kdo byl svědkem surového násilí neštítícího se žádných prostředků, jehož s cynismem bezpříkladným dopustilo se vedení Unie čes. esp. proti zástupcům a členstvu Svazu na II. konferenci rak. esp. v září min. roku, musel by zoufati nad budoucností českého hnutí esp., kdyby nebylo patrno, že toto jednání není výrazem smýšlení členů Unie, nýbrž že to jsou činy jednotlivce, který svého čelného postavení v Unii zneužívá hříšně k ukojení fanatického záští osobního. Používám této zprávy, která snad s jinými dokumenty informovati bude jednou historika čes. hnutí esp., abych upozornil po zásluze na tento zrůdný zjev v esp. světě, na tohoto apoštola esperantismu, který skutečně dle slov písma políbením zrazuje syna člověka, na tuto karikaturu vznešeného ideálu Zamenhofova oblékající se v beránčí roucho esperantismu, aby pravou povahu svou — tomuto ideálu tak cizí — zakryla.

Prosím za prominutí těchto příkrých slov, avšak kdo účastnil se II. konference rak. esp. dá mi zajisté za pravdu.

Jako zástupce Svazu čes. esp. na této II. konferenci rak. esp. prohlašuji při této příležitosti oficielní zprávu výboru „Unie“ o průběhu konference uveřejněnou v „Čas. čes. esp.“ za lživou a dovolávám se pro to svědectví četných členů svazu, kteří se jí súčastnili.

Pokládám zejména za svou povinnost prohlásiti, že chování německých samideánů pražských z klubu „Verda Stelo“ zejména také zesnulého zatím Dra Lederera a Dra Byschitzkého v záležitosti II. konf. rak. esp. bylo zcela nestranné a korektní, a proto ovšem v odporu s jednáním pořadatelstva sjezdu, a ohražujeme se proti bídnému pokusu odvrátiti pozornost esp. publika od nehodného a neesperantského jednání pořadatelstva sjezdu vzbuzováním nacionálního záští proti německým samideánům vymyšlenými a lživými zprávami.

Vzpomínaje vděčně vynikajícího esper. pracovníka Dra Lederera, jehož předčasnou smrtí utrpělo esp. hnutí citelnou ztrátu, konstatuji na základě korespondence a ústních styků tohoto muže s funkcionáři Svazu, že Dr. Lederer schvaloval naše stanovisko v záležitosti II. konference rak. esp., že z toho důvodu také odřekl svou přednášku pro tento sjezd přislíbenou, a že tedy zcela opačná zpráva „Čas. čes. esp.“ uveřejněna patrně v domnění, že mrtvý bude mlčeti, je zcela vylhaná.

Toť všeobecná část mojí jednatelské zprávy. Nešetřil jsem chmurných barev, kde použití jich pokládal jsem za spravedlivé. Domnívám se, že lepší je spravedlivé doznání skutečných poměrů, než pozdější trpké vystřízlivění, když pracnou lží udržované iluse se zřítí.

Avšak přes tyto neutěšené poměry nevstupujeme do nového roku správního beznadějně. Není nás mnoho, ale jsou mezi námi jména, která jsou důkazem, že — abych užil slov historických — esperanto české je v táboře našem, jsou mezi námi soudruzi, kteří nedají klesnouti praporu esperantskému, jest u nás víra, že bojujeme spravedlivý boj proti neesperantské nesnášenlivosti, boj za svobodu spolčování a přesvědčení ve vlasti esperantské, a proto nás konečné vítězství nemine.

LA TUTEŬROPA EMANCIPO DE L' HOMA SPIRITO.

Libera scienca esplorado kaj religia toleremo. Iliaj efikoj en organizacioj socia, ŝtata kaj eklezia.

El *„Dějiny české literatury“* (Historio de la bohema literaturo) de prof. dr. *Jaroslav Vlček* tradukis prof. *Rudolf Fridrich*.

Jam de la deksesa jarcento la fakoj de abstrakta kaj eksperimenta esplorado preparas teron por libera scienca esplorado. *Kopernik* konstruas kontraŭ la eklezia doktrino tercentra la sistemon suncentran, grandioze regulan kaj meĥanike laŭleĝan; *Giordano Bruno*, propra kreinto de l' moderna ideo pri kosmo, instruas pri multeco da mondoj kaj pri senfineco de l' universo; *Galilei* atestas la doktrinon de Koper-

nik per nova teleskopo; *Kepler* perfektigas doktrinon pri la laŭleĝeco de monda fariĝado kaj pri la harmonio de l' universo; kaj en fino de la deksepa jarcento *Newton* hele firmigas unuecon kaj ĝeneralan ekziston de kosmaj leĝoj per la principo de gravitacio de ĉielaj korpoj. La ekzakta eksperimento kaj la senta empirio estas starigita kiel sendanĝera fundamento de pensado, kiu de l' tempo de Newton elvokis ĝeneralan sciencan progreson. Fiziko, ĥemio, medicino, leĝoscienco, nacia ekonomio, filozofio emancipas sin el ĝistiama teologia pensado, la scienco racionaliĝas. *John Locke,* kreinto de la nova filozofia empirio motivigas kaj per induktiva naturscienca metodo sistemigas la principon, ke ĉia fidinda homa kono bazas sur senta sperteco; *Pierre Bayle* malfermas per sia Universala vortaro al ĉi tiuj doktrinoj vojon inter la legantan publikon; *Voltaire,* la unua stilisto de l' jarcento kaj la francaj enciklopedistoj popularigas la esplorojn de Newton kaj de Locke en eŭropaj salonoj de l' dekoka jarcento.

Jam la antaŭulo kaj samlandano de Locke *Bacon* de Verulame difine kaj precize diferencis teologion kaj filozofion, kredon kaj sciencon. Restis plua paŝo: subigi al pensanta racio ankaŭ la enhavon de la religio. Tiun paŝon faris la anglaj deistoj aŭ liberaj pensantoj (freethiker), kies vicon malfermas *Herbert de Cherbury,* mortinta en la jaro de l' paco la Westphalen, kaj fermas *David Hume,* antaŭulo kaj bazo de Kant. Ili instruas, ke la honorigo de la Suprema Estaĵo, prakaŭzo de l' Universo, per virto, pieto, pento kaj pliboniĝo estas kerno de l' religio natureca, kiu estas same aĝa kiel homaro; ke ĉio cetera, precipe la profetaĵoj, mirakloj kaj apokalipsoj estas sole edukaj helpiloj de l' homaro intelekte ankoraŭ nematura; ke la kredo havas sole tiel longe signifon, ĝis kiam ĝi konsentas kun la racio; kaj ke la propra senco de l' Kristaneco, senco neŝanĝebla kaj eterne valora, estas moraleco kaj humaneco. La francaj enciklopedistoj kaj germanaj racionalistoj akceptas ĉi tiun doktrinon, per ili kaj de ili ĝi disvastiĝas pluen en Eŭropo. Devizo de kleruloj de l' dekoka jarcento fariĝas la parolo de *Kant,* kiu diris, ke ekzistas multaj kredoj, sed sola religio, universala, pura religio de racio kaj samtempe libera, fervora, natureca, sur persona konscienco kaj moraleco bazita religio de l' koro. En unu vorto: al principo de empiria esplorado kaj kritika skeptikeco subiĝas ankaŭ la religiaj perceptoj; eĉ la teologio racionaliĝas. (Daŭrigo.)

HUNDO EN LA ĈIELO.

Verkis *Jiří Mahen*. El la bohema lingvo tradukis *Jan Havran*.

Ili staris ĉiuj ĉirkaŭ li kaj ne kuraĝads jam eĉ ekparoli. Maljuna patro, maltimema direktanto de la vivo, estis malĝojigita plej multe. Kiam li intervale kliniĝadis super la fileton, li ŝajnis rigardi ien, kie jam nek la suno brilas, nek floroj floras, nek birdo kantas, en la promesitan landon, kie la piedo de l' homo silente metiĝas kaj stariĝas por ĉiam. Ankaŭ la patrino havis preskaŭ la saman rigardon. Sed en ŝiaj okuloj tremis la plej terurega plendo pro io, kio estas por ĉiam for, detruita kaj perdita.

— Silenton! — diris iu molvoĉe. Kaj ĉiuj anguloj kaj ĉiu linieto sur blanka plafono ripetis tion en lingvo, kiun oni ne aŭdas, sed kiun oni en tiaj momentoj ne povas nekompreni: Silenton! Silenton!

— Frato, frateto mia! — sonas tio kiel eĥo en fratina brusto.

— Paŭlo! sonas tio en frata kapo kiel surda ekkrio.

La plej malgranda el infanoj timeme jam dudek fojojn frotetas anson de pordo. Okuloj estas larĝe malfermitaj, kaj maldekstra mano tenas sur brusto ruleton ĉirkaŭvolvitan en ĉifono.

Dudek kvin jaroj! — pensas kuracisto. — nenia helpo! Li verŝajne havis malmolan vivon, ĉar lin tamen kaptis ftizo. Povas esti, ke li iam eĉ ne satmanĝis, kaj ke li devis el loĝejo en loĝejon — sinjoro studento. Kaj nun venis — oni diru — la venĝo. Jes — jes! Bedaŭrinde — estas malĝoja vero, kaj terurega nia situacio tion ĉiutage dokumentas, ke post kvindek jaroj la statistiko cifere montros, ke dudek kvin percentoj de niaj homoj mortas pro ftizo.

— Panjo — balbutetas infaneto.

Sed tuj la patrino turniĝis, kaptis la malgranduleton sur manojn kaj premis ĝin sur sian amantan koron. Kvazaŭ iu volus ĝin rabi for de ŝi. Kaj poste ŝi turnis sin al fenestro kaj jam centafojon silentege ekploris.

La mortanto ekmovis sin.

Kaj denove estis silentege ... Ĉu li ekmemoros gepatrojn, adiaŭos ilin? Li ankoraŭ unufoje malfermu okulojn! Ili ne vidis ilin jam la duan tagon.

— Nenio ... Silento.

Kaj dume la mortanto sonĝas sian lastan surteran sonĝon.

... Neniu tion scias, neniu, neniu sur la vasta mondo! Sed li — Paŭlo — staras jam ambaŭpiede en la ĉielo.

Kaj tie ĉi ie estas tio, kiel la mortanto movas per mano, dekstre kaj maldekstre de ni ... Tie en malproksimo brulas la suno kaj brilas

la steloj. Sur la ĉielo etendiĝas nubetoj ĝis liaj haroj. Kaj antau okuloj tremas fajreretoj kaj sonas kanto, kiu ne havas takton kaj ŝajne eĉ ne harmonion. Jes, sed tiel estos: la harmonio eksonegos, kiam grandaj aferoj montriĝos sur la horizonto ... Nun ĝi eksonis.

Venas malrapide anĝeloj, post ili iaj maljunuletoj kun blankaj haroj kaj junaj homoj kun tre molaj rigardoj. Kaj-ĉiu, kiel vin rigardas, kvazaŭ etendus al vi manojn.

Kaj jen iras li mem, li vivanta, palpebla, — Sinjoro Kristo kaj diras bele laŭte: Vi jam estas tie ĉi?

Larmoj de la feliĉo eniras okulojn de la alparolito. Li ĉirkaŭrigadas konfuze ...

— Ĉu vi serĉas iun?

Oh! Rapide turniĝas pensoj en la kapo kaj en la animo. La homo tiel volonte ekmemorus; li havas ja tion ie tie skribitan, kiun li ĝoje trovus en paradizo kaj ne povas rememori tion.

Sed kio estas? Ia malnova, forgesita afero, eniras cerbon de la konfuziĝinta homo, li jam pensis — sub tero ĝi dormas kaj ne vekiĝos, sed nun jam ĝi estas tie ĉi kaj superas ĉion alian: Estas tie ĉi Feldman? — demandas Paŭlo.

Vizaĝo de la Savinto estas plena de miro — kaj kiu estas li? — estas demando.

— Hundo!

— Oh! oh!

Ĉiuj ekridetis. Nu, tiu historiaĵo estis tamen certe konata en la ĉielo! — Li — Paŭlo — devis helpi patron, aŭ pli bone dirite — helpadis patron en la malgranda komerceto, kies komercaĵoj ĉiun tagon matene je la kvara horo estis disportataj en vilaĝojn sur veturileto trenata de hundoj. Unu fojon veturis la patro (patro! patro! sonas subite kiel teruregaj sonoriloj) kaj alian fojon la fileto — kaj kun ili ĉiam Feldman kaj Tigro, du fidelaj hundoj. Pluvis, frostis ĉio estis egala; aferoj devis esti faritaj. Ankaŭ plezureto estadis kelkafoje ĉe tio. Ĝi estis tiam, kiam Feldman, maljuna ĉasista hundo, levis buŝon kaj ekflaris leporon. Sufiĉis sole la hundon froteti sur kapo kaj en orelon mallaŭte diri: Feldman! leporeto — leporo — iru! Kaj la hundo rememoris sian junecon kaj sian estintan gloron, kaj kuris ĝis radetoj de la veturileto disiĝadis ...

... Sed poste okazi-s iun tagon, ke la gepatroj dum malriĉo kaj bezonego enskribigis Paŭlon en gimnazion, kaj ke en la gimnazio estis profesoro, kiu estis minacinta al Paŭlo per eligo, se li ne alpor-

tos en lernejon cirkelon. Kaj cirkelo kostis — sepdek krejcerojn. Kaj tiam estis tiela mizero en la familio, ke oni eĉ terpomojn ne kuiris.

Staris la patro en korto kaj ploris. Tia mira, terura vivo rigardis vizaĝojn de ĉiuj, ke oni ne povis fari eĉ unu paŝon el ĝi.

Sciu! diris maltimema direktanto de la vivo — prenu la hundon kaj iru vendi ĝin! Eble iu tamen ion donos por ĝi, kaj eble unu ankaŭ iel sufiĉos.

Post momento staris la knabo kun la hundo en strato kaj ne povis iel moviĝi. La hundo nome rigardis la knabon, kaj la knabo la hundon. Nur post unu horo post sencela vagado tra urbo ekpaŝis en mallarĝan strateton, — al hundbuĉisto. Li longe ridis kaj nur poste pro kompato donis kvardek krejcerojn. La knabo malrapide iris al pordo. Ankoraŭ unufoje li reen turnis okulojn: okuloj de Feldman rigardis lin . . .

Ankaŭ en eterno oni vidas tion: dormis en ili malĝojo de la vivo, dormis en ili senrezulta juneco kaj mizero de estinteco, laco de terure regaj, grizaj tagoj, dum kiuj blankiĝis patraj haroj kaj patrinaj lipoj preĝis preĝon daŭre pli firman kaj pli mirindan.

. . . Havi iam tiun beston ĉe si, povi froteti ĝin, en orelojn direti al ĝi malnovan militan devizon —!

Oh!

Jen ĝi alkuras subite sur neĝblanka substrato de nuboj, havante homan ridon en sia besta vizaĝo, kaj jam eĉ al piedoj aliĝadis sin, kaj jam oni povis eĉ froteti ĝin, senti ĝian spiron, ĝian ĝojon, konfuzon de la juno kaj ĉion tion, pri kio oni jam ne povas paroli.

— — — —

— Silentu! — mallaŭte diris la patro kaj ree kliniĝis super la mortanton. Ĉiuj piete genufleksis. Vizaĝo de la malsanulo subite ekstremetis, manoj ekmoviĝis. La plej feliĉa rideto aperis sur la vangoj. Kaj nun eĉ buŝo ekparolis:

— Iru! — Feldman! — Iru! — Leporeto —! Leporo!

KIO NE ESTIS, ESTAS.

Fabelo. El „Une heure d' esperanto“ (Unu horo de esperanto) de *Théophile Cart* tradukis *Rudolf Fridrich.*

Longe antaŭ la naskiĝo de Homero juna paŝtisto, kiu paŝtadis ŝafinetojn sur la herboplenaj deklivoj de l' Parnaso, unu tagon fortranĉis kanon, faris tien truojn kaj ekludis en sonoj delikataj. Feliĉa, li alvokis

kamaradojn, por ke ili imitu lin. Sed ili ekmokis lin dirante: Ĉu ne sufiĉas birda kanto kaj agrabla voĉo de knabinoj? Por kio oni bezonas novan muzikon?“ Sed, ĉar ilia kamarado ne ĉesis ilin instigi, la Parnasaj paŝtistoj iris konsiliĝi kun grekaj saĝuloj. „Nu, respektindaj filozofoj, diru al ni, ĉu estas ebla ia artefarita muziko?“ La respektindaj saĝuloj karesinte blankajn barbojn respondis en moralinstrua tono: „Ne, infanoj de paŝtistoj, simila muziko ne povas ekzisti, ĉar neniam ĝi estis; kaj eĉ se ĝi estus ebla, ĝi, kiel muziko de barbaroj, similus al vana knarado kaj ĥaoso de sonoj neaŭskulteblaj por delikata aŭdosento.“ La paŝtistoj triumfe revenis al siaj ŝafinetoj kaj ree mokis sian eltroveman kamaradon. Li tamen estis persistema: konstante li tranĉadis kanon kaj rekomendis ĝin al kamaradoj. Ili fine akceptis kaj ekludis ankaŭ en tre delikataj sonoj.

Jen, la origino de artefarita muziko. Ĝi ne ekstermis birdkanton nek silentigis agrablan voĉon de knabinoj. Ĝi vivas, ho grekaj saĝuloj, kaj ĝi vivos tiel longe, kiel homoj estos!

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

La urbo de l' oka internacia kongreso de l' esperantistoj. Kraków (legu Krakuv), antikva metropolo de Polujo, hodiaŭ ĉefurbo de la samnoma grandduklando, kuŝas ĉe la fervojlinio Wien-Lwów, sur la maldekstra bordo de la rivero Vistulo (Wisła), en ĉarma ebenaĵo ĉirkaŭita de malaltaj montetoj. Ĝia pentrinda situacio, multenombraj kaj grandiozaj vidindaĵoj de netaksebla historia valoro kaŭzas, ke Kraków estas volonte vizitata de fremdaj turistoj. Tie ĉi oni povas trovi la plej puran tipon de Pollando. La urbo havas (de la jaro 1910) 21 kvartalojn kun 160.000 loĝantoj. Ĝi estas sidejo de rom-katolika princ-episkopo, de korpusestro por okcidenta Galicio, de supera tribunalo, de landaj tribunaloj por civilaj kaj kriminalaj aferoj, de provincestra delegito kaj de diversaj aliaj estraroj. Ĝi posedas 41 preĝejojn, 34 monaĥejojn, 8 sinagogojn, 1 universitaton, 7 gimnasiojn, 2 superajn realajn lernejojn, komercan akademion, superan industrian lernejon, akademion de belaj artoj, 2 knabinajn liceojn, 6 instruistajn seminariojn kaj 41 popolajn lernejojn. Krom multaj korporacioj sciencaj, industriaj kaj bonfaraj ekzistas en Kraków Akademio de sciencoj, Muzika konservatorio, Societo por belaj artoj kaj Popola teatro. Kraków apartenas al la plej malnovaj urboj de Polujo kaj estis ĉiam ĉefurbo de la suda Pollando. En la jaro 1000. Boleslavo la Granda kreis la unuan eparkion. En la jaro 1364. Kazimiro la Granda fondis la unuan polan universitaton. Post la pereo de Polujo okupis la urbon Prusoj (1794) kaj pli malfrue Aŭstrianoj (1796). La kongreso en Wien (1815) formis el Kraków kaj ĉirkaŭaĵo respublikon, sed en la jaro 1846 ĝi estis aligita al la aŭstria monarkio. En la tagoj 11.—18. de aŭgusto 1912. la urbo estos loko de la VIII. internacia kongreso de l' esperantistoj. (El „Ilustriata gvidlibro pri Kraków kaj ĉirkaŭaĵo“ de la societo „Esperanto“ en Kraków). *O. S.*

Uzado de mielo. Ne estas sufiĉe konate, ke la mielo estas ne sole bonega nutraĵo, sed ankaŭ malmultekosta kaj sendanĝera kuracilo por multaj malsanoj. Per la digestado ĝi tute transiras en la sangon ne lasante eĉ la plej malgrandan restaĵon. Danke ĉi tiun econ ĝi estas mirinda fortigilo por malfortuloj, klorozuloj, rapide kreskantaj infanoj kiel ankaŭ por maljunuloj. Mielo posedas antisepsajn ecojn, kaj ĝia uzado sekve estas rekomendinda kiel antaŭforigilo por malsanoj de l' gorĝo, kiel tuso, raŭkeco, difterio ktp. Ŝmiraĵo farita el mielo efikas bonege kontraŭ ĉiuj malfermitaj vundoj, ulceroj kaj similaj malsanoj. Tiu ŝmiraĵo ne sole ŝirmas la vundon kontraŭ

la enpenetro de malpuriga aero, sed ankaŭ vivigas rapide kuracigan forton. (El „Konsiloj pri higieno" de R. Stole). *J. Borel.*

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

Oficiala maldecaĵo kontraŭ ni? (II.) S-o Kühnl skribis, ke la sekretario de „Centra oficejo esperantista" s-o Chavet diris: „Mi scias ja, ke en Bohemujo estas sole la Unio, kiu laboras." Ni diris (Boh. esp. VI, 1, 9), ke oni ne povas kredi al s-o Kühnl, kaj ni postulis la klarigon. Jen la oficiala klarigo, kiun ni ricevis: „Paris 10. februaro 1912. S-o Mil. Schmidt, Praha II 1036, Bohemujo. Estimata sinjoro prezidanto, Respondante vian leteron de la 1a de februaro lasta, mi devas diri al vi, ke tre certe mi neniam esprimis la opinion, kiun oni atribuas al mi pri la laboroj de la bohemaj Asocio kaj Unio. Mi ĉiam zorgis eviti ĉiun agon aŭ parolon, kiu povus ŝajni montri partiemon aŭ preferon. Mi tute ne konas la internajn aferojn de la bohemaj esperantistoj kaj ne volas miksi min en ili. Mi plie protestas energie kontraŭ tiu metodo, kiu konsistas represi aŭ rediri vortojn de iu aŭ alia ne avertinte la interesanton, en la celo naski suspektojn aŭ pli akrigi la malpacojn, ĉar tiu metodo, laŭ mi, estas tute kontraŭa je la samideaneco kaj interna ideo de la esperantistaro. Kun mia plej alta estimo Gabriel Chavet." — Mallonge: s-o Chavet faris neniun maldecaĵon, li estas pura en tiu ĉi afero — ni plezure tion konstatas. Kaj ni konstatas per tio: s-o Kühnl mensogas. E n l a f r u n t o d e l'U n i a n o j e s t a s h o m o, k i u m e n s o g a s! Kia estas morala sento de la homoj, kiuj tion toleras? *K. H. Bouška.*

